**Esperanto** estas fascina lingvo, kun signifa parol-komunumo en pli ol 130 landoj tra la mondo. La strukturo estas simpla kaj regula sen la malfaciligaj esceptoj, kiuj ne kontribuas al la komunika riĉeco de lingvo. Tiuj faktoroj liveras lingvon pli facile lernebla ol aliaj etnaj lingvoj. Tia lingvo unike taŭgas por internacia uzo.

**Esperanto** estas lingvo kun sia propra kulturo, kreita antaù 130 jaroj kaj poste pluevoluigata inter aktivaj uzantoj. Okazis kaj pluokazas ĉiu-jare centoj da renkontiĝoj tra la mondo – loke, regione, lande, kontinente kaj monde. Ĝi posedas imponan literaturon, teatrajn prezentojn, muzikon, filmojn. Plie, ĝi estas valora ponto inter naciaj kulturoj, precipe tiuj de malpli parolataj lingvoj. La celo estas subteni tiujn lingvojn kaj kreskigi la lingvan kaj kulturan riĉecon de nia mondo.

**Esperanto** estas justa lingvo, ĉar ĝi estas je dispono de ĉiu – ne nur de tiuj kun la rimedoj, kontaktoj kaj tempo por lernadi etnajn lingvojn. Ĝi lokas homojn sur egalecan bazon kaj donas al ĉiuj eblecon de pli facila komunikado transnacia.

**Esperanto** estas lingvo, kiu malfermas la mondon al al siaj uzantoj. Multaj parolantoj havas bazan kaj firman kredon je internacia harmonio kaj toleremo de kulturaj diferencoj.

**Esperanto** – resume: fascina, kulturpera kaj justa lingvo universala.

Universala Esperanto-Asocio

en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko

***Bonvolu aldoni ĉi tie la kontakto-informojn de via loka aŭ landa informejo pri Esperanto***